

4^a trimestro 2015

En tiu numero
vi legos..



Bierfarado (sekvo)

daŭrigo de la ĉapitro pri ingrediencoj

Daŭrigo de la
scienca kaj tek- p.1
nika raporto de p.2
Denis pri bier- p.3
farado.

Okaze de la Za-
menhofa festo
nia grupo orga-
nizis viziton de
la muzeo pri
Rabelezo en lia
domo de La De-
vinière. Ĉiuj
partoprenantoj
ricevis libreton p.4
entenanta kla-
rigojn pri la vi-
vo kaj verko de
Rabelezo, kopii-
tajn el Vikipe-
dio. Jen paĝoj
pri Gargantuo
kaj traduko far
Edmond Privat
de la Pikrokola
Milito.

Kia diferenco
inter kontraŭk-
nalo kaj berva-
laĵo? Verŝajne
tiuj ĉi humuraj
(kaj malĉas-
taj!) vortludoj
plaĉus al Rabe-
lezo. Kelkaj ek-
zemploj kom-
pletigos tiujn,
kiujn vi trovos
en via PIV(sed
mi ne donos sol-
vojn!) p.8

La ingrediencoj necesaj por fari bieron.



hordeo



lupolo



akvo



gisto



Klarigoj pri gisto :

Gisto, precipe *Saccharomyces cerevisiae*, estas simpla eŭkariota ĉelo, kiu funkcias kiel modelo por ĉiuj eŭkariotoj inkluzive de homoj por la studo de fundamentaj ĉelaj procezoj kiel ekzemple ĉelciklo, DNA* reproduktado, rekombino, ĉeldividiĝo kaj metabolo. *Saccharomyces Cerevisiae* DNA estas tute konata edkde la 24-a de aprilo 1996, kaj tio estas la unua konata eŭkariota genaro (12 Mpb, millionoj da bazaj paroj). Siatempe ĝi estis la plej kompleksa DNA-vicrivelada organismo.

En 2010, pli ol 30 gistaj estis vicriveladitaj. Homa kaj muŝa ge-

*DNA = ADN en la franca, La desoksiribonukleata acido (DNA) estas duhelica molekulego, kiu portas la genetikajn informojn de ĉiuj vivuloj kaj de certaj virusoj. Ĝi estas la portanto de la genaro kaj la bazo de heredo.

naro estas de 3.400 Mpb, Maizo 5.000 Mpb.

Gisto bezonas ne nur sukron por kreski sed ankaŭ aliaj nutraĵojn kiel vitaminon B1 tiel kiel ĝi koncentras tiun vitaminon ĉele. Pro tio oni uzis rekemon kiel medikamenton.

Ceteraj ingrediencoj

Plej ofte tiuj kvar ingrediencoj sufiĉas por la bierfarado sed ne ĉiam.

Grenoj :

Aliaj grenoj povas anstataŭi hordeon ofte kombine. Ili povas esti ofte maltigitaj aŭ ne laŭ receptoj:

- Tritikobiero : Weissbier / Weizenbier, Berlina blanka, Hogaarden, Blanka de Namur,
- Sekalobiero : Roggerbier, Kvaso (rusa panbiero, senalkohola)
- Miliobiero : Ĉefe tradica Afrikana biero, Tchapalo biero [ĉapalo]
- Sorgobiero : Ĉefe tradica Afrikana biero, Kafir biero.

Notu ke la Anĝeluso biero (ĉe Lepers) entenas maltan sekalon.

Specialaj aldonaĵoj :

Aliaj klasikaj aldonaĵoj : mielo, glukozo, sakarozo, maltozo, orangŝelo, koriandro, kano-bo ...

Gruito :

Gruito estas aparta aldonaĵo aŭ pli precize aldonaĵaro, kiu estis kutime uzata dum mezepoko.

Gruito estas antikva herba miksado, kiu aromigis kaj amarigis bieron antaŭ komuna uzado de hordeo. Ĝi entenas ĉefe :

- Miriko (*marĉmiriko*)
- Artemizio (*Artemisia vulgaris*)
- Akileo (*Achillea millefolium*)
- Glekomo (*Glechoma hederacea*)
- Baloteo (*Marrubium vulgare*)
- Eriko (*Kaluna vulgaris*)

Ceteraĵoj

Sed ne nur, entute bierfaristoj uzis pli ol 64 plantojn. En Francio, je la fino de la 19-a jarcento oni ankoraŭ vendas ĉe apoteko kuracilajn bierojn : tonika, diureziga, antiskorbuta, apetiga, antikapdolora, laksiga, ktp...

La Maltigado

Dum la maltigado la greno fariĝas malto. Malto estas la ĉefa ingredienco de biero kaj viskio. Oni maltas ĉefe hordeon, sed tiu procezo validas ankaŭ por trikito, sekalo kaj aliaj grenoj.

Tiu etapo estas necesa, ĉar gistoj ne povas uzi la glucidajn rezervojn (amelo) de la greno. Fakte gistoj ne havas la taŭgajn enzimojn por fermentigi grandajn molekulojn kiel amelon. Gistoj uzas nur simplajn glucidojn kiel glukozon.

La maltigado konsistas en la industria replikado de natura evoluo de greno, por ke ĝi produktu iujn enzimojn necesajn por la konvertiĝo de amelo en sukeroj (sakarifikado), kaj sekve, por la produktado de alkoholo dumfermentado pere de gistoj.


**Maltigado konsistas el kvar fazoj: trempado, ĝermado, sekigado, ĝermforigo.**

Trempado celas vekigi la grajnon kiel en la naturo, printempe. Por ĝermi la grajnoj bezonas humidon kaj varmecon.

Unue oni purigas la grajnoj. Post purigado, oni trempigas la grajnoj en varmeta akvo (inter 14°C ĝis 18°C) dum 24 ĝis 48 horoj. Pli precize, trempado konsistas el humidigo de grajnoj per du aŭ tri alternoj de trempotempoj kaj spirtempoj. Dum tiu fazo la grajno malhardiĝas.

Tiu operacio okazas en vastega halo aŭ en ronda silo, kiu lente turniĝas. La grajntavola profundo povas atingi unu metron.

Dum la trempado la humideco kreskas de 15% al 45% .

**Ĝermado**

La ĝermado estas la periodo dum kiu la grajnoj ekĝermas, kaj sekve ekproduktas enzimojn kiel amilazojn, fosfatazojn aŭ peptidazojn, kiuj estas necesaj por la sakarifikado de amelo. Dume, la ĝermo spiras kaj kromproduktas karbonacidon, kiu malrapidigas la ĝermadon. Pro tio oni devas

konstante provizi la ĝermaĵon per oksigeno el pura aero.

La enzimarado produktita per la ĝermo ebligas disigon kaj penetron tra la hemiceluloza bariero. Tiel la ĝermo povas aliri al la amelo enhavo de la grajno kaj transformi la amelon en glukozo (ĉefe), kiu estas karbohidrato metaboligebla fare de gisto (tiel kreante alkoholon kaj CO₂).

Dum la ĝermado, la tuto de la grajna amelo ne fariĝas sukero. Ne gravas ĉar la plua amelizado aŭ sakarifikado okazos poste. Gravas la enzimoj.

Ĝermado daŭras inter 4 ĝis 6 tagoj. La procezo estas stirita per kontrolo de akvo, temperaturo kaj oksigeno por obteni la serĉatan kvaliton. La rezultprodukto nomiĝas verda malto..

Post tiu etapo la natursimila procezo finiĝas. Dum la sekvaj etapoj la verda malto fariĝos industria produkto kun precizaj ecoj.



Sekigado kaj rostado

La sekigetapo celas redukti la grenan humidon kaj pro tio ĉesigi la ĝermprocezon. Samtempe tiu etapo povas enteni rostadon, kiu multe gravas por la aromo kaj koloro de bieroj.

Entute, la verda malto sekiĝas dum 24 ĝis 48 horoj per aero kaj post la sekigado, la humido falas je 4%.

Distingitas tri fazoj laŭ la temperatura kurbo.

Dum la unua sekigfazo, la aertemperaturo estas malvarmeta por sekigi la grenon sen denaturigi la enzimojn.


Post la unua sekigfazo, la grajno jam sekiĝis kaj tio ebligas altigi la aertemperaturo por plu sekigi ilin. Lente, la temperaturo altiĝas ĝis 80°C.

Dum la lasta sekigfazo, kiu povas inkluzivi rostadon, la alta aertemperaturo estas konservata dum 4 horoj. Por pilsna biero la temperaturo estas 80°C, sed ĝi povas altiĝi ĝis 110°C por karamelkoloraj maltoj kaj eĉ pli por iuj malhelaj maltoj.

Tiam la aromoj de malto formiĝas kaj distingiĝas. Same la koloro de la malto vidiĝas kaj tio dependas de la temperaturo kaj de la rostado. Finfine, la biera koloro dependas rekte de la koloro de la malto.

Kiaj transformiĝoj okazis ene de la grajno dum tiuj etapoj? Sekiĝo haltigas la kreskadon de la ĝermo, kaj alta temperaturo mortigas la ĝermajn ĉelojn.

Notinde: altegaj temperaturoj super 80°C ne nur mortigas ĉelojn, sed provokas rimarkindajn biokemikajn reakciojn kiel la malkombinado de kelkaj sulfoniaj molekuloj. Je pli altaj temperaturoj, la enzimoj ekdenaturiĝas, do ili ne plu funkcias. Tamen, ili estas gravegaj por la daŭrigo de la sakarifikado. Do, kiel rostigitaj maltoj povas alporti la bezonatajn enzimojn? Ili ne povas. Oni devas miksi helan malton kun rostita malto, por ke la hela malto alportu la bezonatajn enzimojn.



Senĝermigo (sur venonta Turangia Luko)

Denis Jeanteur

Ĉe Rabelezo

(artikolo el Vikipedio)



Rabelezo (france : François RABELAIS) estis franca verkisto de la Renesanco. Li naskiĝis ĉirkaŭ 1494 en La Devinière [devinjer] (proksime al Chinon [ŝinon] - Francio). Lia patro estis advokato en Chinon. Antaŭ liaj medicinistudoj, kiajn li komencas en 1530 en Montpellier li iris en klostro ĉe la Benediktanoj.

Li iris en klostro ĉe la Benediktanoj.



Eksterordinara figuro de sia epoko, li estis ne nur benediktana monaĥo, sed ankaŭ kuracisto, profesoro pri anatomio, kaj paroĥestro en Meudon.

En 1532 li kreis Gargantuo kaj Pantagruelo, kaj poste skribis la romanojn *Horribles et épouvantables faits et prouesses du très renommé Pantagruel* (1532), *la vie inestimable de Gargantua, père de Pantagruel* (1534), kaj aliaj verkoj *Tiers Livre* (1546), *Quart Livre* (1548), kiuj rakontas la sekvajn aventurojn de tiuj roluloj.

Sprita kaj klera, li estas perfekta ekzemplo de la renesanca spirito, la humanismo, renoviĝo de la filozofio kaj pensado. Li ŝatas miksi en sia verkaro la epikuran moralon, la gajecon kaj amon de vivo, filozofion pri la naturo. Li parte disvolvis kaj renovigis la francan lingvon de la 16-a jarcento, donante al ĝi pitoreskan kaj sukoplenan "guston".

Universitato Sorbonne tamen malaprobis liajn verkojn, kaj la katolika elkezio malpermesis ilin. François Rabelais mortis la 9-an de aprilo 1553.

GARGANTUO

Gargantuo estas la ĉefa heroo de la dua libro

de François Rabelais eldonita 1534. Ĉi tiu romano kontinuas la sukcesoplenan historion de la unua libro, *Pantagruelo* (1532). Pro timo de cenzuro fare de la Universitato de la Sorbono, li publikigas ambaŭ verkojn sub kaŝnomo *Alcofribas Nasier*, anagramo de François Rabelais.

Kompleta titolo de la verko : *La vie très horrique du grand Gargantua, père de Pantagruel* [Vere horora vivo de la granda Gargantuo, patro de Pantagruelo].

Prezento de la verko

Literaturkursoj por francaj lernantoj kutime tute ignoras la Mezepokon kaj komencas tuj per François Villon aŭ Rabelezo. Gargantuo estas do amuza maniero enkonduki literaturon en Francio.

Farso kaj seriozeco

La tuta verko prezentas sin kiel farso: Tie ĉio estas nekredblaĵo, kaj la giganteco de la herooj — Rabelezo verŝajne inspiris sin de la giganto Gargan el la keltaj legendoj — estas okazo por diversaj troaĵoj, tiel la dufoja urinado kun drona konsekvenco, aŭ la epizodo de la religivojaĝantoj, priskribita en la Mimesis de Erich Auerbach, en la buŝo de la gigantulo.

Poste, la tuta historio okazas nur en la tut-eta ĉirkaŭaĵo de la naskiĝloko de Rabelezo. Kiu interesiĝu pri tio? La krudeco de la vortoj, Rabelezo tute libere parolas pri merdo, nazelfluoj ktp... eble interesus kelkuloj; sed konsentinte, li havas medicinajn sciojn kaj scipovas mildigi sian vortelekton per helenaj derivaĵoj: tiuj nekutimaj vortoj tuj imponas respekton kaj donas seriozan aspekton al la tuton!

Sed finfine, la scenaro estas ridinde maldika : Gargantuo naskiĝas, oni lernas iom pri lia infaneco, okazas tiu stulta milito pretekste de kelkaj panbultoj kaj la venkintoj ricevas rekompenson. La historio entenus en du liniojn ! Tamen, se sekvi la prologo, estas pli da profundeco en la verko. Fakte ni havas tri verkojn almenaŭ : Unu traktato pri pedagogio, unu traktato pri la arto reĝi kaj unu utopia libro.

Edukado

La infaneco de Gargantuo estas preteksto por kritiki la tiam ankaŭ kutimaj skolastikaj metodoj instrui infanojn, primoki la trouzon de la argumento de aŭtoritato kaj la tro meĥanika pensmaniero. Per tiutipa lernado, la tiel lerta Gargantuo tute idiotiĝas, sed vidu, tuj post ŝanĝo de lernometodo, li rebrilas ! Ponokrates estas tute lerta instruisto, kaj fakte, li vere malfermas la menson de siaj stu-

dentoj : ne nur la Biblio kaj kelkaj latinaj verkistoj estas studobjektoj, sed fakte la tutan mondon, ĉiuj metioj, ĉiuj verkoj kaj libroj, kaj ne nur en la latina.

Konsilaro al Potenculoj

La epizodo pri la milito prezentas du malaj manieroj regi : Pikrokolo, kun sia glorsonĝo, kaŭzas nur katastrofojn, ruiniĝon, morton. Male, la pacamanto Grangousier havas prosperan reĝdomon, li doneme traktas sian popolon, kaj eĉ la venkitan armeon de la malamiko. Lia donemo eble eĉ troas, ĉar la viktimoj ricevas kompenson laŭ siaj deklaroj sen ajna kontrolo. Kiu kredus tion? Estas notinde ke en tiuj politikajoj, Rabelezo patrujame kaj vuale kritikas la imperiestron Karlo la 5-a de Germanio kaj diskrete laŭdas la reĝon de Francio Francisko la 1-a.

Utopio

Finfine, post tiom da kritiko, Rabelezo proponas idealan socion, tiun de la monaĥejo de Telemo (kies nomo signifas : de la libervolo). Tamen, Rabelezo ne maltrafas la okazon kritiki religiojn : la monaĥejo estu kontraŭmodelo. Sensenca aŭtoritato ne ekzistas ĉi-tie, la aŭtoritato venas de la nura libervolo de la monaĥoj : ili decidas kiel ili vivas, kion ili faras, kiam, kiel ili vestiĝas, kaj kiel longe ili restas en la monaĥejo, ĉar jes, ili rajtas foriri ! Sed oni ne eraru, tiu monaĥejo ne estas loko por fari kion ajn ; estas loko, kie sin perfektigi (simbolo por tio estas la ĉiea ĉesto de la cifero 6) en iu ajn el la bibliotekoj; estas loko kie moderneco kaj antikereco, viroj kaj virinoj, libereco kaj dediĉo harmonie kunvivas. Oni rimarku ĉi-tie la influon de la Sonĝo de Polifil, kiu ankaŭ enhavas libervolajn temojn kaj estis modelo ankaŭ por la stilo de la arkitektura priskribo de la monaĥejo.

Liberpenco kaj Humanismo

Indas mencii finfine, ke la libro estas manifesto de la humanisma idealo de la Renesanco. En tiu kadro, ĉiuspeca klarigo per "ĉar tiel estas" aŭ per "ĉar tiu diris" ne plu taŭgas.

Sulta religio, kie sufiĉas sekvi leĝojn aŭ komandojn de pratempuloj ne plu kontentas Rabelezo. La influo de la evangeliismo de Lefevre d'Étample kaj Erasmo, kritiko al la katolika eklezio sentebblas diversloke. Rabelezo ekzemple pridubas la katolicismon de reĝoj kiuj nomas sin katolikaj : reĝoj devus estri laŭ kristanaj leĝoj, kiel skribitaj en la evangeliuoj, kaj ne simple nomi sin katolikoj. Tion ne sufiĉas!

Rabelezo liberpensecon ankaŭ efikas sur educa-

da kampo: La nurlatina erudicio de la Mezepoko, kun ĉiama aludo al Plinio la Juna, estas nun subjekto al kritiko, kaj ne malofte ĉe Rabelezo, preteksto por ridi. Kaj, kiel jam aludita en la paragrafo pri edukado, erudicio signifas de nun, multe scii pri ĉiuj fakoj ! Oni rekonas tie la ideon de la Renesanco, scii pri ĉion.

Resumo de la verko

En prologo, Rabelezo alparolas la leganton por atentigi lin ke ne sufiĉas konsideri la eksteran formon de la libro, sed indas eltiri de ĝi "la substantifique moëlle" [la substantan medolon]. La libro aspektas kiel nura farso, sed ĝi enhavas seriozan penson.

Infaneco kaj edukado de Gargantuo

Grangousier [Granguzie], patro de Gargantuo ŝategas manĝi. Li edziĝas kun Gargamelle [Gargamel], filino de la reĝo de la Papilioj. El tiu unuiĝo naskiĝas Gargantuo, kiun ŝi portis dek-unu monatojn. Laŭ Rabelezo, longa gravedeco estas antaŭsigno, ke la ido estos « ĉefverko ». Gargamelle, graveda de Gargantuo, buĉigas centmilojn da bovoj por antaŭfasta festo, kaj invitas amikojn al tiu giganta manĝado. Spite al sia gravedeco kaj al la admonestoj de sia edzo, Gargamelle manĝegas tripoj kaj drinkegas vinon. Ili dancas, kantas, kverelas, ebrie parolas. Sed Gargamelle sentas tirojn en sia ventro, kaj naskigas Gargantuon per nekutima vojo : li eliras el ŝia orelo kaj tuj petas drinki !

La patro ĝojkrias : « Que grand tu as [Kia granda ci havas, prononcu : kegrantua] ». De tie la nomo Gargantua. Por lin nutri, necesas miloj da bovinoj. La infano estas vestita per senmezuraj ŝuoj, vestaĵoj, zono, spado. Grandgousier elektas la kolorojn blanka kaj blua. Rabelezo profitas la okazon por diskuti la signifon de koloroj ekde la antiko ĝis hodiaŭ.

Oni poste priskribas la infanecon de Gargantuo. Ĝis lia sesa jaraĝo, li rajtas fari ĉion ajn, kiom li volas, sen limito : li do manĝas, dormas, postkuras papiliojn laŭ plezuro. Li similas aliajn infanojn. Gargantuo ricevas lignoĉevalon, tiel ke li fariĝu lerta kavaliro. Li tiom interesiĝas pri rajdado ke li memfaras proprajn lignoĉevalojn. Gargantua havas spritan menson, kaj eĉ inventas pugpurigilon el junaj birdoj... Tiom da klereco estas por Grangousier nepre fleginda, li do sendas sian filon al fama teologisto Thubal Holoferno, por ke li lernu la latinan. Li tion faras laŭ mezepokaj metodoj: perkere, ambaŭdirekten, kaj en gotikaj literoj.

La patro rimarkas ke Gargantuo idiotiĝas. Kiam

Holoferno mortigās, li decidis elekti Ponokrates, laŭ rekomendo de amikoj. La studentoj de Pono-krates estas invititaj kaj parolas tiel bele kaj fa- cile ke Grandgousier tuj volas tiun instruiston por sia filo. La reĝo de Numidio sendas gigantan ĉevalinon. Dank'al tiu donaco, Gargantuo povas ekiri al Parizo por sekvi Ponokrates. Dumvoje, la ĉevalino forviŝas mukojn kun tiom da forto ke la tuta arba- ro de Beauce estas detruita.

En Parizo, Gargantua faras diversajn stultaĵojn : li urinas sur la loĝantoj kaj preskaŭ dronigas ĉiujn, li ankaŭ forprenas la sonorilojn de Notre-Dame por donaci ilin al sia ĉevalino.

La metodo de Ponokrates havas du etapojn. En la unua, li ne intervenas sed observas lian studenton. Poste, li donas al li horaron por organizi sian tagon en zorga studado. La Biblio estas la centro de la studado, sed ankaŭ sporto kaj higieno havas gra- van rolon. Gargantuo tiel lernas ĉiujn metiojn kaj fariĝas erudiciulo.

La pikrokola milito

Dum vinberkolektado, panistoj de la najbara reĝdomo trapasas, sed rifuzas vendi siajn panojn. Sekvas kverelo, post kiu la panistoj iras plendi al sia reĝo pri la okazaĵoj. Malbone inspirata de glorsojfantaj ĝeneraloj, la reĝo marŝas kun siaj trupoj en la landon de Grandgousier, detruante ĉion dumvoje. Tamen, dank'al siaj grandaj muroj, la monaĥejo de Seuilé rezistas. Frato Jean [Ĵan], sentime eliras la murojn kaj tiel bastonfrapas la soldatojn, ke ili mortas. Grandgousier auŝkultas la novaĵojn, sed nepre volas pacon.

Grandgousier skribas al Gargantuo por peti helpon. Samtempe, li sendas mesaĝulon al Pikrokolo, li eĉ sendas monon kaj panojn, — kaŭzo de la milito — sed Pikrokolo nur vidas en tio signon de malforto. Gargantuo reveninte el Parizo partoprenas en la milito. Vole, kiam li detruas la kastelo de Vède, senvole, kiam lia ĉevalino urinas tiom ke la rivero superakvas kaj multaj malamikoj dronas.

Li finfine alvenas ĉe Grandgousier, kaj kombante sian hararon, vidas kanonkugloj defalantaj : Gar- gantuo ne rimarkis ilin dum li detruis la kastelon de Vède. Sekvas manĝado, sed Gargantuo deziras memprepari salaton : en la lektuko kaŝas ses pil- grimojn, kiujn Gargantuo preskaŭ manĝis.

Dum la vespermanĝo, Grandgousier klarigas al Gar- gantuo la kialon de la milito, kaj laŭdas la kuraĝon de frato Jean. Tion aŭdinte, Gargantuo ordonas ke oni venigu lin. Frato Jean estas tute agrabla kun- trinkulo, spite al ĉiuj kontraŭmonaĥaj antaŭjuĝoj.

Post la manĝado oni ataku la armeon de Pikrokolo. Sed Gargantuo ne kapablas dormi. Por lin helpi, la monaĥon konsilas lin preĝi psalmojn. Post du vor- toj, Gargantuo endormiĝas. Meznokte, atako : dum la batalo frato Jean restas pendigita al nuksarbo. La kunuloj liberas lin, ne sen primokoj. Frato Jean forlasas sian militvestojn kaj konservas nun basto- non.

Pikrokolo imagas sin ke Gargantuo kaj siaj kunuloj estas diabloj : pro tio, li akvumigas sian soldatojn per benita akvo. Ili tamen ne povas rezisti kaj for- kuras. Frato Jean postsekvas ilin, estas kapturata, sed sukcesos liberiĝi. Dumtempe, unu el la malami- koj, Tukedijono, kapturatas.

Grangousier decidis liberigi Tukedijonon, tiel ke li konvinku sian reĝon de la stulteco de la entrepre- no. Tukedijo proponas al Pikrokolo ke li faru pacon, sed pro la donacoj de Grangousier, Hastivau pridub- as la lojalecon de Tukedijono. Ĉi-lasta protestas kaj murdas Hastivau, kaj estas murdita de Pikro- kolo. Milito pliiras, kaj la kastelo de Pikrokolo es- tas atakata. Pikrokolo foriras.

Tempo estas por paco. La soldatoj de Pikrokolo rajtas hejmeniri, kun iom da mono. Tamen, la kon- silantoj de Pikrokolo restu prizonuloj. La herooj de la milito ricevas bienon kaj rajtojn, la kampara- noj monon por kompensi la detruojn kaŭzitaj de la milito.

La monaĥejo de Telemo

Por rekompensi fraton Jean, Gargantuo donas al li la landon Telemo-n, kie li konstruu monaĥejon, kie reĝu religio mala al ĉiuj aliaj. Baza vorto estu tie : libervolo. Oni longe priskribas la monaĥejon, ĝiajn konstruaĵojn, bibliotekojn, ktp.

En la utopia monaĥejo rajtas eniri nur belajn sa- najn homojn. Ili vivas laŭ propra volo, vestiĝas laŭ propra volo, kaj viroj eĉ rajtas viziti virinojn ! Ĉiuj monaĥoj vere faras laŭ propra volo, ne ekzistas sonorilon por dikti al ili, kiam ili kion faras. Fakte ili ĉiam rajtas foriri.

LA PIKROKOLA MILITO

(Jen traduko de Edmond Privat en la revuo Espe- ranto de Majo 1928. Oni povas elŝuti ĝin el la re- tejo de Österreichische National Bibliothek)

Kiel iuj registaranoj de la reĝo Pikrokolo lin metis en grandan danĝeron per tro urĝa konsilo.

Ŝtelinte la kukojn aperis antaŭ Pikrokolo la du- koj de Menuail, grafo Spadulo koj kapitano Ster-

kulo diris al li : " Moŝto, hodiaŭ ni igos vin la plej feliĉa la plej kavalira princo iam estinta en la mondo depost la morto de Aleksandro Makedona !

- Kovru, kovru vian kapon, diris Pikrokolo.

- Grandan dankon, Moŝto, diris ili ; ni faras nian devon. Jen la rimedo : vi lasu ĉi-tie unu kapitanon por gardado kun bandeto da viroj por ŝirmi la lokon, kiu ŝajnas al ni sufiĉe fortika, ĉu pro naturo, ĉu pro la muregoj konstruitaj laŭ via eltrovo. Vian armeon dispartigu duope, kiel vi mem tro bone scias. Unu parto iros ataki tiun Grandgousier kaj liajn homojn. Per ĝi li tuj estos facile venkita. Tie vi trovos monon en amasoj, ĉar la malnoblulo havas kontantan sumon. Malnoblulo, mi diras. ĉar nobla princo neniam posedas eĉ heleron. Trezorumi estas kutimo de malnoblulo.

La cetera parto vojaĝos ol Onys, Sanktonge, Angomois kaj Gaskonio kune Perigot, Medok, kaj Elanes. Sen rezisto vi prenos urbojn, kastelojn kaj fortikajojn. En Bayonne, St. Jean de Luk kaj Fontarabio vi kaptos ĉiujn ŝipojn kaj bordirante al Galico kaj Portugalujo, vi rabos ĉiujn marlokojn ĝis Lisbono, kie vi ricevos helpon de tuta maristaro necesa al venkulo. Per korp' de Dio ! Hispanujo kapitulacios ĉar estas nur dormuloj tie. Vi trapasos la Sibilan markolon kaj tie starigos du kolonojn, pli belegajn ol la Herkulesaj, je eterna memorigo de via nomo, kaj estos nomata ĉi-tiu markolo la "Pikrokola Maro".

Post paso de la Maro Pikrokola, jen Ruĝabarbo sin igas jam via sklavo.

- Mi, diris Pikrokolo, lin prenos je kompto.

- Bone, diris ili, nur se li lasas sin bapti. Tiam atakos vi la reĝlandojn de Tuniso, Hippines, Alĝero, Bon, Koron, brave la tutan Barbarion, preterpasante retenos en via mano Majorkon, Minorkon, Sardenion, Korsikon kaj ceteraj insulojn de la maro Ligura kaj Baleara. Bordirante maldekstre vi regos la tutan Galujon Narbonon, Provencon kaj Allobrogojn, Genova, Firenze, Luques kaj plaĉos al Dio, Romon. La kompatinda sinjor' papo jam ekmortas pro timo.

- Honorparole, diris Pikrokolo, mi ne kisas jam lian pantoflon.

- Kaptinte Italujon, jen Napoli, Kalabrio, Apulo kaj Sicilio, ĉiuj plene rabitaj kaj Malt' insulo kune. Mi ja ŝatus vidi ĉu la ŝerc'kavaliroj iam Rodesaj provus reziston al vi !

- Mi irus, diris Pikrokolo, tre volonte al Lorette.

- Nenio, diris ili, nenio; vi iros revenante. Poste ni prenos Kandion, Cipron, Rodezon, insulojn Cikla-

dajn kaj alvojaĝos Moreon. Ni ĝin jam tenas. Sankta Prenulo ! Dio gardu Jerusalemon ! Eĉ sultano ne kompareblas al via potenco,

- Mi, diris li. konstruigos la Templon de Salomono ?

- Ne jam, diris ili ; atentu momenteton. Ne estu tiel subita en viaj entreprenoj. Ĉu vi scias kion rekomendis Oktavian-Aŭgusto? *Festina lente*. Decas unue posedi; Azion Minoran, Kurion, Likion. Pamfilon, Cilicion, Lidion, Frigion, Mizion, Betunon, Ĥarazion, Satalion, Samaragion, Kastamena, Luga, Savasta, ĝis Eŭfrato,

- Ĉu ni vidos. diris Pikrokolo, Babilonon kaj la Monton Sinai ?

- Vi ja ne bezonas, ili diris, por la nuna momento. Ĉu ne sufiĉe lacige ke ni jam traveturis la Maron Hirkanan, transrajdis ambaŭ Armeniojn kaj la tri Arabiojn ?

- En vero, li diris, ni freneziĝos. Ho kompatinduloj !

- Kion ? ili diris,

- Kion ni trinkos en tiuj dezertoj ? Ĉar Julian-Aŭgusto kaj lia tuta armeo tie mortis pro soifo, kiel oni rakontas.

- Ni, diris ili, jam ordonis pri ĉio. Trans la Maro Siria, vi ja ricevos naŭ mil dek kvar grandajn ŝipojn, ŝarĝitajn de la plej bonaj vinoj en la mondo ; ili alvenas al Jaffa. Tie troviĝas dudek ducent mil kameloj kaj mil sescent elefantoj, kiujn vi kaptis en ĉaso enirante Libion, same vi kaptas la tutan karavanon al Meko. Ĉu ili ne havigis al vi la vinon en sufiĉo ?

- Bone, li diris, sed ni ne trinkis freŝe.

- Per virto ne de fiŝeto, ili diris, bravulo, venkinto, pretendanto kaj sopiranto al tutmonda imperio ne povas ĉiam havi komforton. Dion vi laŭdu ke jam alvenis vi kaj viaj homoj. sane kaj tute, ĝis la rivero de l'tigro.

- Sed, li diris, kion faras dumtempe tiu parto de nia armeo, kiu venkas la malnoblan fuŝan Grandgousier ?

- Ili ne haltas, diras ili ; ni tuj ilin renkontos. Ili jam prenis por vi Bretonujon, Normandion, Flandrujon, Haynault, Brabant, Artoys, Hollandon, Seelandon : ili transpasis la Rejnjon sur la ventro de la Svisoj kaj parto el ili jam venkis Luksemburgon, Lorenon, Ĉampanion, Savojon ĝis Lyon, kie ili trovis viajn regimentojn revenintajn el la maraj venkoj ĉe Mediteraneo. Tiam ili kunvenis en Bohemujo, rabinte Ŝvabion, Vurtembergon, Bavarujojn, Aŭstrion, Moravion kaj Stirion. Poste ili kune almi-

litis fiere Lubekon, Norvegujon, Svedujon, Dacion, Gotion, Groenlondon kaj insulojn ĝis Maro Glacia. Tion farinte ili venkis Orkadojn, Skotlandon, Anglujon kaj Irlandon. De tie vojaĝante trans la maro sablara koj Samartoj, venkis kaj subigis Prusujon, Polujon, Litovujon, Ruslandon, Valakion, Transsilvanion, Hungarujon, Bulgarujon, Turkujon kaj estas jam en Konstantinoplo.

- Ni iru, diris Pikrokolo, ilin retrovi kiel eble plej frue ĉar mi volas esti ankaŭ imperiestro de Trebizondo. Ĉu ni ne mortigos ĉiujn tiujn hundojn malkredanajn ?

- Diablo, ili diris, kion alian ni foros ? kaj vi disdonos iliajn bienojn kaj terojn al tiuj, kiuj vin servis honeste,

- Racio, li diris, postulas tion. Estas nur juste. Mi donas al vi Karmonion, Sirion kaj tutan palestinon.

Tĭe ĉeestis ankaŭ unu maljuna ĝentilhomo, elprovita en diversaj okazoj kaj vera spertulo pri milito. Laŭnome Eĉefron. Aŭdinte tiujn babilajojn, li diris :

- Mi tre timas ", ke tiu tuta entrepreno estos simila je la farso pri la poto de lakto el kiu riĉiĝis iu ŝuisto en revo ; poste rompiĝis la poto kaj li ne havis eĉ el kio tagmanĝi. Kia estos la fino de tiom da laboroj kaj veturoj?

- Ĝi estos, diris Pikrokolo, ke ni, reveninte ripozos en komforto.

Al tio rebatis Eĉefron : " kaj se hazarde vi neniam revenus ? Ĉar la vojaĝo estas longa kaj danĝera. Ĉu ne pli bone, ke ni ripozu nun evitante tiujn riskojn ?

- Ho, diris Spadulo, jen bela revulo ! Ni kaŝiĝu ĉe la kameno kaj tie kun la sinjorinoj pasigu nian vivon kaj tempon almetante perlojn al fadenoj aŭ ŝpinante kiel Sardanapalo. Kiu ne riskas aventuron havas nek ĉevalon, nek mulon, tion diras Salomono.

- Kiu tro aventuras, rebatis Eĉefron, perdas ĉevalon kaj mulon, tion respondis Malkon

- Sufiĉe ! diris Pikrokolo. ni transiru. Mi nur timas tiun diablajn regimentojn de Grongousier. Dum ni rajdos en Mezopotamio, se ili atakas nian voston, kia rimedo ?

- Tre bona, diris Sterkulo, bela trinkmoneto, kiun vi sendos al Moskovanoj, tuj alkampigos al vi por momento kvarcent kvindek mil elitajn batalantojn. Ho se vi sendos min tien kiel leŭtenanton vian, mi jam mortigos la tutan bandon ! Mi mordu, frapu, kaptu, buĉu, senkompatu !

-Al batalo, al batalo, diris Pikrokolo, urĝu. rapide ! kaj kiu min amas, tiu min sekvu !"

Pri kontraŭknavoj (el Vikipedio)

Kontraŭknavo estas vortludo konsistanta el interŝanĝo de literoj aŭ silaboj de du vortoj, aŭ ene de unu vorto. "Mielkuko" > "kiel muko" ; "Plejnova nutro" > "Plejnova putro"

La terminon kontraŭknavo enkondukis Raymond Schwartz en sia romano *Kiel akvo de l' rivero* (1963), kie unu el la herooj, Hans Paulig, abunde uzas tiajn vortludojn.

Schwartz karakterizas Paulig jene: vorto kiel mielkuko senmanke elfluis el lia buŝo "kiel muko"; preta kafe fariĝis "kreta pafo" kaj tiel plu. Sekvas multaj ekzemploj de kontraŭknavoj el la buŝo de Paulig, ekzemple: se via blondulino donos piskermeson, ho pardonu, kispermeson, ... Kiu laboradas senpaŭze, laboros fiŝe kaj muse ! Pardonu, volis diri fuŝe kaj mise.

KIO ESTAS BERVALAĴO ?

Se deklamisto, anstataŭ «Ho mia kor'», diras «Ho, kia mor'», li ridigas la publikon, farinte bervalajojn. Verdire tio ne estas ĝuste bervalajo, ĉar la interŝanĝo de literoj aŭ de silaboj en frazo devus kaŝi maldecan signifon. «Trenu pramon» anstataŭ «prenu tramon» estos nur seninteresa langostumblo. Male, se anstataŭ: «Ŝi ĉiam puŝas siajn kunludantojn ĉe la teniso» vi diras : Ŝi ĉiam tuŝas siajn kunludantojn ĉe la p..."., vi faras bervalajojn.

Kelkaj aliaj kontraŭknavoj el Beaucaire*...

⊛ Se vi volas alligi la vagonon, lasu vian planon ĉe la ĝiĉeto.

⊛ Ne restu en polaj limoj. Tra la Mizera Fundo vi atingos la eteron.

⊛ Mi premas la manon je cia vico.

⊛ Tra la malgranda kilsono la fakulo ne sukcesis trovi la prunon.

⊛ La amaso de tiom da anasoj kondukas al perturbo de la klubo.

⊛ Vidante la pacan kapon, la virta geologo demandis sin, ĉu la pastro malhelpos lian kisadon.

*Beaucaire estas la verkisto de la libro : *Kruko kaj Baniko el Bervalo*, 1970)

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine

Halles de Tours

Place G. Paillhou

37000 TOURS

Tel : 02 47 44 62 12

esperanto-touraine37@wanadoo.fr

<http://esperanto-tours.1s.fr>